

Johann Wolfgang von Goethe,

## Noktolido de migranto

*tradukita de Richard Schulz*

Vi, sendito de l' chiel',  
Foriganto de doloro,  
Antau kies brila hel'  
Forsekighas chiuj ploroj,  
- Ve pro la adado laco,  
Kia de la faroj fin'? -  
Dolcha paco,  
Nestu do en mia sin'!

*Traduko de la Germana poemo "Wanderers Nachtlied" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (\*1749-08-28 - †1832-03-22) en Esperanton de RICHARD SCHULZ (Rikardo Ŝulco, \*1906-07-12 - †1997-09-26).*

*Arg-738-1490 (2013-02-26 15:13:51)*

*Tiu poem-esperantigo trovighis sur la pagho 136 de la "Vestfaliaj Flugfolioj" eldonitaj de Richard Schulz (Rikardo Shulco). Pri Richard Schulz vidu la vikipedian retejon [http://de.wikipedia.org/wiki/Richard\\_Schulz](http://de.wikipedia.org/wiki/Richard_Schulz).*

Johann Wolfgang von Goethe,

## Wanderers Nachtlied

Der du von dem Himmel bist,  
Alles Leid und Schmerzen stillest,  
Den, der doppelt elend ist,  
Doppelt mit Erquickung füllest,  
- Ach, ich bin des Treibens müde,  
Was soll all der Schmerz und Lust? -  
Süßer Riede,  
Komm, ach komm in meine Brust!

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (\*1749-08-28 - †1832-03-22).*

*Arg-738-1489 (2012-12-29 13:21:26)*

Johann Wolfgang von Goethe,

## Noktokanto de migranto

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Vi, venanto de l' chielo,  
Foriganto la doloron,  
Freshiganta per mielo  
De l' sufereganto koron,  
- Min plenumas ega laco!  
Kial tiu ghoj' kaj ve'? -  
Dolcha paco,  
Venu, mi sopiras tre!

*Traduko de la Germana poemo "Wanderers Nachtlied" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (\*1749-08-28 - †1832-03-22) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04) en 1983-06-17.*

*MR-063-2 / Arg-738-1491 (2012-12-29 13:38:37)*